

pola

sendependa revuo  
de polaj esperantistoj

# esperantisto

fondita en 1906 ★ n-ro 1/2005 ★ ISSN 0032-2431



**La historio avertas...**

**1**  
**2005**

## Enhavtabelo:

3	Auschwitz–Birkenau avertas <i>Bogustaw Sobol</i>
4	Li atendas... <i>Bogustaw Sobol</i>
5	La dormanta urso <i>Kazimierz Leja</i>
6	Kiel ni mortigadis Doktoron Esperanto? de Leo Belmont <i>Andrzej Warszawski</i>
8	Bedaŭrnde ĝi estas nia <i>Roman Dobrzyński</i>
11	Diskuto pri entombigo de Czesław Miłosz – klarigoj de <i>Bogustaw Sobol</i>
17	Letero... Propono al la tutmonda samideanaro <i>Duilio Magnani, Bogustaw Sobol</i>
14	Simboloj de Esperanto–movado tutmonde <i>Marian Kostecki</i>
20	Raporto pri XXII Esperantaj Tagoj de Krakovo <i>Stanisław Śmigieński</i>
22–25	Tago de E–libro; Oblata renkontiĝo en Varsovio; Nova estraro de PEA Szczecin; La 25a Internacia Renkontiĝo de Popolaj Orkestroj; Muziko de eŭropaj nacioj; Novaj interretaj paĝoj; Esperanto–Teatro ESPERO.
25	Preskaŭ ĉio pri la prepozicio „DA” <i>Czesław Baranowski</i>
28	Demandoj pri pola historio... <i>Eduardo Kozyra k. a.</i>
30	La bestoj (1) <i>Danuta Żelińska</i>
32	Distra paĝo <i>Marian Zdankowski, Bogustaw Sobol</i>

## Pola Esperantisto

sendependa revuo de polaj esperanti-  
stoj. Aperas 6 fojojn jare.  
N-ro 1/2005 – ISSN 0032–2431  
eldonkvanto (nakład): 250 ekz.

**Redaktoro:** Kazimierz LEJA

Ĉiujn korespondajojn kaj kontribuojn sendu  
nur al la redaktoro.

**TTT-paĝo:** [www.hejme.e-tools.pl](http://www.hejme.e-tools.pl)

**Retpoŝto:** [kleja@hejme.e-tools.pl](mailto:kleja@hejme.e-tools.pl)

**Tel.:** (+48 32) 265 00 38 (nur vespere!)

*La redaktoro rezervas al si rajton  
mallongigi kaj redakti la tekstojn.*

**Jarabono enlanda:** 30,00 PLN pagenda al:  
Wydawnictwo Hejme, PL 41–250 Czeladź,  
str. Wąska 21, skrytka 59  
mBank: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644

**Jarabono eksterlanda:** 12,00 EUR pagenda  
al: UEA-konto: <kazl-s> aŭ FEL-konto:  
<leja-t>. Por aerpoŝta sendado aldonu 6  
EUR. Nepre informu eldonejon pri via pago!

## *Auschwitz–Birkenau avertas*

En terura koncentrejo,  
la plej granda mondtombejo,  
malfacile trovi vorton  
por priskribi homan sorton.

Sangas ŝtonoj, kor' doloras,  
de teruro sablo ploras,  
ĉar pretigis sur la tero  
hom' por homo la inferon.

En fumtuboj kri' haltiĝis,  
korpoj homaj cindr' fariĝis.  
Kaj senkulpa sanga maro  
nun avertas la homaron.

La 27an de januaro 2005 en la 60a datreveno de liberigo de la koncentrejo Auschwitz–Birkenau okazis en Pollando grandaj kaj gravaj solenaĵoj, kiujn partoprenis multaj eksterlandaj delegacioj, prezidentoj kaj tiuj, kiuj sukcesis liberiĝi kaj vivas, atestante pri la teruraĵoj, kiujn ili travivis. Bedaŭrinde milionoj da homoj de diversaj nacioj, precipe judoj, poloj, romoj, pereis, estis brutigitaj. Mi dediĉas mian poemon okaze de tiu ĉi terura okazintaĵo.

**BS**

## *Li atendas...*

Apud grandaj magazenoj,  
ĉe altaj domegoj,  
luksaj hoteloj, restoracioj  
Li staras,  
sidas,  
aŭskultas,  
rigardas  
pere de malgajaj infanaj okuloj  
en tria mondo  
kun dikaj ventroj pro malsato.

Li etendas manon.  
Li petas  
peceton de nigra pano.

Kaj ni...?  
Ni deturnas kapojn.  
Ni ne volas vidi, aŭdi, scii.  
Kion ni faras  
por malriĉaj,  
malsanaj,  
malsataj,  
senhejmaj?  
Kion ni al Li faras?

Ĉiutage ni Lin renkontas.

Li atendas...

Malfermu la okulojn!

## **La dormanta urso**

Kiam venas nova jaro, en mia kapo naskiĝas la demando: eble tiu ĉi nova estos pli favora ol la pasinta? Kaj tiu ĉi demando devigas min pripensi la aferojn antaŭajn, finitajn kaj ne, miajn planojn kaj eĉ... revojn. Kiom da ili realiĝis sukcese? Ĉu mi atingis miajn planojn? Kion fari nun, por plibonigi aferojn venontajn?

Kiel simpla homo mi pensas, ke ankaŭ estraroj de esperantistaj organizaĵoj agas simile. Pripensas, diskutas, planas, kaj ĉio ĉi por plibonigi sian funkciadon, atingi planitajn celojn, plivastigi sian agadon per rimedoj novaj, modernaj kaj tiuj bone konataj: „informado, instruado, utiligado”.

Mi bone memoras la tempon de mia freŝa esperantisteco (antaŭ pli ol 25 jaroj). Por mi, tiam juna homo, stagnado kaj kontento pri aktuala stato (kiu ja ne estis tiel senpasia, senperspektiva kiel nun) estis neimagebla! Sed – kio estas eĉ pli interesa – pli aĝaj, maturaj esperantistoj, estis ankaŭ tre aktivaj, dediĉantaj siajn talenton kaj tempon por publika bono. Tiam preskaŭ neniu kalkulis je propra profito, rekono en Esperantujo kiel iu speciale grava; pli grava estis disvastigi Esperanton, fari tion *komune* kun impeto, konstante serĉante mankantajn rimedojn...

Resumante la pasintan jaron oni povas ĝoji, ke en Pollando okazis aferoj gravaj por nia movado. En kelkaj lokoj Pollando vere brilis pro aktiveco de siaj anoj. Sufiĉas tralegi pri tio en *Pola Esperantisto*. Neatendite (kaj ne planite) pri Esperanto povis aŭdi kaj legi homoj, kiuj tute ne interesiĝas pri nia lingvo, dank' al Etsuo Miyoshi aŭ Małgorzata Handzlik... Tamen, pri kio alivorte skribas en sia felietono Roman Dobrzyński, mankas en niaj vicaj profesiaj agoj *plani* kaj respondecaj agantoj, kiuj scipovas *utiligi* ŝancojn neatendite venantajn, kaj ankoraŭ pli rapide forkurantajn de *dormanta urso*...

Impona kolekto da poŝtmarkoj, vizitado de E-aranĝoj, eĉ ofta partopreno en UK-oj ne sufiĉas por konvinki tiun magian 1% da poloj pri la valoro kaj ekzisto de Esperanto! Nur persista, komuna agado, planita kaj realizata ĝis fino, povas alporti sukcesojn, kiuj ĉiam estu: novaj adeptoj de Esperanto.

Instigante al la legado de iom malfruiĝinta numero de PE, mi invitas ĉiujn esperantistojn plenigi paĝojn de VIA REVUO per propra kontribuo. Mi admonu ankaŭ tiujn, kiuj ĝis nun ne pagis abonkotizon: pagu por vi mem kaj por via najbar(in)o, proponante al li/ŝi senpagajn lecionojn de vi farotajn!

*Sukcesan Novan Jaron!*

**Andrzej Warszawski**

## **Kiel ni mortigadis Doktoron Esperanto?**

**de Leo Belmont**

En oktobro 1905 Leo Belmont verkis pollingve humoraĵon titolitan *Jak zabijaliŝmy Doktora Esperanto?* (Kiel ni mortigadis Doktoron Esperanto?). Ĝi estis publikigita en *Kurjer Codzienny* (Ĉiutaga Kuriero). En 1912 li aperigis ĝin broŝurforme kiel aldono al la revuo *Wolne Słowo* (Libera Vorto) n-ro 151 kun jenaj dediĉvortoj:

*En la jaro de la esperantista kongreso okazonta en Krakovo  
al eminenta tradukanto de „Mazepa” kaj „Halka” en Esperanton Antoni Grabowski  
al oferema redaktoro de „Pola Esperantisto” Jan Günther  
al brila tradukanto de „Faraon” kaj „Na dnie nędzy” Kazimierz Bein  
tiun ĉi malgajan humoraĵon kiel respektosigno de amikeco donas la aŭtoro.*

Belmont rememoras la tempon, kiam la broŝuro de „Lingvo Internacia” jam kuŝis kaj ankoraŭ kuŝis malantaŭ fenestra vitro de librovendejo, kiam ni, varsoviaj, krevante pro rido pri nova „lingvo internacia”, preterpasadis laŭ tiu ĉi fenestra vitro, kiam „Kurier Warszawski” pririgardinte la libreton tra fenestra vitro, informis legantojn, ke d-ro Esperanto eldonis „Volapük de Schleyer por poloj”. Oni sciigis ankaŭ, ke la nova „ĵargono” estas nelegebla, ĉar en ĝiaj vortoj mankas vokaloj. Oni eĉ mokis, ke la ununura paciento de d-ro Zamenhof estas Esperanto mem. Tiam Belmont publikigis artikolojn pri Esperanto en la revuoj *Prawda* kaj *Ateneum* montrante avantaĝojn de la nova lingvo kaj ĝian superecon kompare kun Volapük. Samtempe Belmont, ankoraŭ ne estante 25-jara, provis fondi Esperanto-klubon. Kvarfoje li provis allogi konatulojn, kolegojn kaj amikojn deklamante „*Sur la kampo for de l’mondo*”. Kaj kvarfoje li fiaskis, sed finfine la kvinan fojon ekestis klubo konsistanta el ses personoj. Ni ĉiuj ses estis fervoraj esperantistoj. Por la ideo de unu lingvo en internaciaj rilatoj, por la lingvo fratigonta homaron ni pretis salti en flamojn. Post ĉiu kunveno la klubanoj iris drinkejton kaj en aparta ĉambreto ili drinkis je *la sano de d-ro Esperanto, lia lingvo kaj perejo de Volapük*. Tostojn oni proponis esperantlingve.

La dudekkvina kunsido okazis jubilea. Komence la solenaĵo estis tre ĝojiga. Sed poste la miksaĵo de ruĝa vino, sodakvo, nigra kafo kaj citrono kaŭzis, ke la partoprenantoj ekkonsciis ekziston de pluraj kontraŭuloj de Esperanto. Por la kontraŭuloj la internacia lingvo estas neviva, nebla esprimi ĉion, nenature facila, eĉ neuzbla. Kaj fine Oleŝ, unu klubano, konkludis: *Kaj mi diras al vi, ke en Varsovio la lingvo Esperanto ne povas disvolviĝi... per la kulpo de d-ro Zamenhof, kreinto de la lingvo.*

– *Neniam homa grandeco povas esti pritaksita, se ĝi estas proksime. Se ni troviĝas ĉe montobazo, ni ne konjektas altecon de montosupro. Varsovio ne povas pritaksi grandecon de la kreinto de la lingvo internacia, ĝis kiam li estas ĉi tie kun ni. (...)*

– *Ni ĝenerale ne aprezas proprulojn. Ni bezonas markon eksterlandan! Tio, kio naskiĝas ĉe ni, kaj estas tute nova, nekutima, ne povas ĝisatendi rekonon, ĉar unue devas aprezati tion franco, germano, anglo kaj atesti pri ĝia valoro! Ni pritaksas homojn aŭ post pristampado de ili fare de eksterlando, aŭ... post ilia morto! (...)*

La klubanoj multe drinkadis, malbenadis, malesperigadis, filozofadis kaj babiladis. Sed ne nur. Ili venis al iu grava konkludo. Belmont raportas sekvontajn okazintaĵojn jene:

*Sufiĉas scii, ke en fina, absolute logika konsekvenco de niaj konsideroj, aspergitaj per vino, ni verdiktis d-ron Esperanton je morto.*

– *Por bono de la ideo!*

– *Por feliĉo de l' homaro!*

Belmont proponis, por ke oni instigu d-ron Esperanto al memmortigo. Antek kaj Wacek kontraŭstaris opiniante, ke d-ro Esperanto sin ne memmortigu. Laŭ ili la ideon de la Lingvo Internacia plifamigos sekretplena murdo ankoraŭ hodiaŭ nokte. Sekve Antek kaj Wacek iris loĝejon de d-ro Esperanto, ellitigis lin kaj venigis nokte al Pole Mokotowskie (Kampo de Mokotów).

– *Majstro!... por bono de via ideo... vi devas morti!*

Malagrabla mirigita doktoro hezitis:

– *Sinjoroj, eble ne estas tutnepre, ke mi tuj mortu. Por morgaŭ mi havas du menditajn kuracvizitojn.*

– *Stultaĵo – kriegas Antek – nun temas pri homaro, kaj ne pri du malsanuloj.*

– *Sed mi esperas, ke homaro sen mia subita morto konvinkiĝos, ke mia verko havas por ĝi valoron.*

– *Majstro, Varsovio neniam, Varsoviaj oni ne konvinkigos. Nur „Kuriero” devas informi, ke vi mortis. Murdita vi renaskiĝos en memoro de varsoviaj.*

*Kaj nun oni aŭdas ronkosimilan voĉon de kelnero:*

*Sinjoroj, ni devas fermi... Oni devas leviĝi... Jam post noktomezo.*

*Mi rigardas miajn manojn – sango – ruĝa vino. Aliaj dormas surkanape, surtapiŝe, malpurigitaj per vino. Post tiu ĉi kunveno ses esperantistoj likvidis la*

## **Bedaŭrinde ĝi estas nia**

En la interreto mi trovis proteston de Bogusław Sobol pro la misuzo de lia nomo en la numero 6/2004 de „PE”, kie oni false atribuis al li aŭtorecon de la artikolo „**Diskuto pri entombigo de Czesław Miłosz**”. Mi sentas bezonon solidariĝi kun samideano Sobol, ĉar mi ankaŭ ne dezirus, ke oni marku per mia nomo tiuspecan artikolon. Mi estimas la intencon de la Redaktoro fari „Polan Esperantiston” tribuno de liberaj opinioj, tamen estus bone, ke tiel tendencajn artikolojn akompanu aliaj opinioj. Ja „PE” estas dumonta revuo kaj verŝajne la prezentataj en ĝi opi-

nioj restas „unusolaj veroj” por kelkaj legantoj, aparte por eksterlandanoj.

Ne unufoje mi aŭdis de eksterlandanoj: „Kial poloj subtaksas ĉion polan?”. Mi respondas per la anegdoto. „Vi estas virino bela, saĝa, ĉarma kaj bonkora, sed bedaŭrinde vi estas mia edzino”. Ŝajnas, ke oni same pensas ne nur pri Czesław Miłosz, sed ankaŭ pri Esperanto: „Bedaŭrinde ĝi estas nia!”. La konstato koncernas polojn ĝenerale kaj kiel tia ĝi ne povas esti tute vera, ĉar ja ekzistas esceptoj, ekzemple Johano Paŭlo la Dua. Mi estas profunde konvinkita, ke la pola



---

*klubon kaj d-ro Esperanto plu vivas.*

Sekve la aŭtoro resumas artikolon de Paul Fruictier el la aperigata en Parizo revuo „Lingvo internacia”. En la artikolo titolita „Tri tagoj en Esperantolando” estis nomitaj ekzemploj de praktika uzado de Esperanto, provoj de ĝia enkonduko en ĉiutagan vivon.

Belmont finas sian malgajan humoraĵon per jenaj vortoj:

*Esperanto naskas entusiasmon kaj tial ĝi triumfos.*

*Jes en Francujo – sed... en Varsovio?*

*Se temas pri progreso ni ja ŝatas lokon fine de la vivo.*





nacieco de la papo estas grava faktoro de lia rilato al Esperanto.

Johano Paŭlo la Dua ekde kelkaj jaroj uzas Esperanton en siaj benoj okaze de Kristnasko kaj Pasko. Tio estas grandega donaco por la Esperanto-movado, eĉ duobla, ĉar li estas ne nur la ĉefpontifiko de la Katolika Eklezio, sed ankaŭ la ŝtatestro de Vatikano. Dank' al la eksterordinara personeco de la papo lia aŭtoritato disvastiĝis ekster la katolika mondo kaj speciale estas agnoskata de grandega plimulto da poloj. Tamen kiom da poloj scias, ke la papo uzas Esperanton? Unu procento? Eĉ tion mi dubas. Gravus do tute alia demando: Kion faris ni, esperantistoj, por konsciigi al aliaj poloj, ke la papo ne nur favoras, sed ankaŭ uzas Esperanton? Ni demandu pli konkrete: Kion faris tiurilate Pola Esperanto-Asocio kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj? Ili aktuale abundas en Pollando. Ĉu almenaŭ oni diskutis pri tiu temo?

Alia aspekto de la afero. En la jaro 1999 dum la ekumena diservo en Drohiczyn la papo akceptis el la manoj de d-ro Ludoviko Zaleski-Zamenhof la „Medalon de Toleremo” establitan de la Zamenhof-Fondumo en Bjalistoko. La estiĝo de la medalo kaj la proceduro enmanigi ĝin al la papo estas en si mem unika kaj interesa historio. (Legu pli en la libro „Ulica Zamenhofs” – p. 55–58, aŭ en „La Zamenhof-strato” – p. 200–202). Johano Paŭlo la Dua, akceptante la medalon, donacis al nia movado neaprezeblan propagandan instrumenton. Ekestis unika ŝanco ĉiujare ho-

nori gravajn personojn per la distingo markita de la papa aŭtoritato kaj tiamaniere aŭtomate aliri amaskomunikilojn. Kaj kio okazis? Nenio. Nek la Fondumo-Zamenhof, nek unu el ĝiaj membroj – PEA movis per fingro por elprofiti tiun ĉi ŝancon. Dum ni perdis tiujn kvar jarojn, alia organizaĵo ĉiujare enmanigas samspecan medalon. Dum aliaj profitas, ni preferas plendi kaj pretendi.

Jen okaze de la Kristnasko 2004 „Gazeta Wyborcza” publikigis tekstojn de la fama kanzono „Paca Nokt” en ĉiuj lingvoj de la Eŭropa Unio kaj en Esperanto. Bela surprizo! Sur la apuda paĝo aperis multlingvaj Kristnaskaj bondeziroj. Ĉifoje Esperanto ekbrilis simile al la Betlehema stelo kiel la unua super 40 lingvoj: **Feliĉan Kristnaskon kaj Bonan Novjaron.** Tiutaga eldono de „GW” superis unu milionon da ekzempleroj. Valorega donaco, ĉu ne? Ne, tute ne!

Senlaca Eduardo Kozyra el Malborko enlasis la Esperantigitan publikaĵon de „GW” en la interreton. Rezulte aperis jena komento de samideano, kies nomon ni preterlasu, ĉar gravas ne nomoj, sed problemoj. La citaĵo estas ekzakte kopiita.

„Dziwny tekst otrzymałem od Ciebie z życzeniami z „Gazety Wybiórczej”. W żadnych z tych tekstów no może Vanoce nie ma nic o najistotniejszym, o Bozym Narodzeniu, o Wcieleniu Boga w ludzka dole, zyczenia sa typu Wesolych Świat, ale jakich? To takie troche w duchu New Age, w duchu zamazywania tego o co tak

naprawde w tych swietach i w tych zyczeniach chodzi, a przynajmniej powinno chodzic”.

Mi gratulis al la redakcio de la „Elekta Gazeto” pro la aperigo de la Esperantalingvaj tekstoj. Evidentiĝas, ke mi misagis aŭ eĉ pekis. Kiel katoliko mi ne rajtis gratuli la „Selektan (Wybiórcza) Gazeton”, sed mi devis insulti ĝin pro la teologia malpraveco, ĉar la Kristnaskaj bondeziroj estis malbone vortumitaj. Bedaŭrinde nia spertulo pri la kristana doktrino ne proponas alian sole pravan tekston. Kia ĝi devus esti?

Scivoleme mi rigardis la kelkdekon da poŝtkartoj ricevitaj, kiel kutime, fine de la jaro. Ili ĉiuj estis „takie troche w duchu New Age”, surhavis la saman tekston: „Wesołych Świąt i Szczęśliwego Nowego Roku!”. Ilian ikonografian elementon prezentis plej ofte kristnaskarbo aŭ la maljuna koboldo nomata Sankta Nikolao. Ĉu tio ĝenis min kompreni la esencon de la bondeziroj kaj la intencojn de la sendintoj? Ankaŭ mi ne dubas, ke esperantistoj, kiuj estas veraj katolikoj, facile kapablis „selekti” la gravan por ili sencon de la bondeziroj publikigitaj en la „Selekta Gazeto”. Kial ili do ataku la ĵurnalon pro la propagando de Esperanto?

Fakte temas ne pri la „GW”, aŭ pri ĝia politiko rilate al la lingvo internacia, sed pri iu konkreta redaktoro, kiu prizorgis la bondeziran aferon. Mi ne scias, kiu ŝi/li estas, tamen oni povas konstati, ke la persono amike rilatas al Esperanto kaj eble konas ĝin, ĉar

uzis la lingvon senerare. Verŝajne ŝi/li proprainiciate aldonis Esperanton al 40 aliaj lingvoj. Se tiun redaktoron atingis la riproĉo de la esperantisto-fundamentisto, mi timas, ke ŝi/li ne plu propagandos Esperanton.

Tamen ni esperu, ke tiu persono ricevis alian mesaĝon de Bogusław Sobol kun la plusenda alvoko de pastro Duilio Magnani, kiu prezentas la vidpunkton tute kontraŭstaran al ĉiuspeca fundamentismo. La itala pastro multe kontribuis por tio, ke la pola papo uzas publike Esperanton. Urĝe necesas influi la Vatikanajn instancojn pludaŭrigi tiun ĉi kutimon. La pastro alvokas la tutmondan esperantistaron konsciigi al la Apostola Sidejo, ke ekzistas tra la mondo amaso da homoj, kiuj deziras aŭskulti la papajn benvorotojn en la internacia lingvo.

„Tiu ĉi propono – skribis la pastro Magnani – atingu eĉ la gesamideanojn de aliaj kristanaj kredkonfesioj (Esperanto kiel ekumena lingvo), tiujn de la aliaj religioj (Esperanto por la interreligia dialogo), la ne-kredantojn kaj la ateistojn”. Mi pensas, ke en tiuj ĉi vortoj de la itala pastro respeguliĝas la konvinkoj de la papo mem, kiuj permesis al li akcepti la esperantistan „Medalon de Toleremo”.

Mi certas, ke leteron al Vatikano sendos Etsuo Miyoshi, kvanakam li ne estas kristano, sed konfesanto de la japana religio Oomoto. La japanan industriiston necesas mencii, por ke la artikolo finiĝu optimisme. Ankaŭ li faris pasintjare grandan propagandan komplezon al la po-

la Esperanto-movado. Mi pensas pri la tutpaĝa artikolo en „Rzeczpospolita” (25.09.04) kaj pri la lingva debato en Varsovio (26.09.04). Ĉifoje la propagandajn agojn sekvis konkretaj rezultoj, unue laŭ iniciato de Margareta Handzlik establiĝis grupo de eŭroparlamentanoj por promocii Esperanton, due Etsuo Miyoshi decidis ĉijare komenci konstruadon de sia fabriko en Malborko. Eble la jaro 2005 evidentiĝos la plej grava en la historio de la pola movado, ĉar la konstruo de fabriko en la urbo, kiu suferas altan senlaborecon, signifos pli grandan propagandon por Esperanto ol miloj da surpaperaj teorioj.



Oni petas skribi leterojn, eĉ mal-longajn, kun danko al la papo kaj peto daŭrigi la uzon de Esperanto en la papaj benoj, al kardinalo Angelo Sodano.

**RD**

#### *Kara Roman*

Mi elkore dankas al vi por la supra artikolo. Verdire, pri sinteno de multaj samlandanoj ni devas honti; tiom pli malagrabla, ke stultaj vortoj kaj akuzoj venas ofte el buŝoj de esperantistoj. Malfacile estas nomi ilin samideanoj, kvankam ni uzas la saman lingvon...

Rilate la aŭtorecon de la artikolo pri Czesław Miłosz, vi povas legi apude. Kaj mi nur aldonu: se mi volus kalkuli je ies rapida reago, mi unue devus ricevi ĝin ne en lasta momen-

to, kaj due, mi devus havi efektive la aron da kunlaborantoj, kiuj tamen ne ekzistas. Malĝoje estas tion diri, sed eĉ tiuj, kiuj povus saĝe kontribui al PE, sindetenas de tio...

**Kazimierz Leja**

## **Diskuto pri entombigo de Czesław Miłosz – klarigoj**

Kara Sinjoro,

Mi tutkore dankas pro la sendita nova numero de „Pola Esperantisto”. Por la jaro 2005 mi abonis 2 ekzemplerojn. Certe Vi jam tion rimarkis.

Dankon pro la publikigo de la poemo, kiun verkis s-ro Leszek Łęgowski kaj mi tradukis. Mirigis min nur mia subskribo apud la artikolo: „Diskuto pri entombigo de Czesław Miłosz”. Mi tiun artikolon ne skribis. Se mi bone rememoras mi legis iam la saman artikolon en interreto, sed ŝajnas al mi, ke la tekston dissendis Staszek Mandrak aŭ iu alia.

Eble mi transsendis ĝin al aliaj gesamideanoj kaj inter alie al Vi, sed ne estas mia teksto. Estas nur ebleco, ke ricevitan artikolon mi pere de reto transsendis. Nun mi timas, ke Staszek aŭ alia aŭtoro de la teksto povas ofendiĝi. Kaj eble sendis ĝin s-ro Dobrzyński? Vere mi jam ne memoras. Mi nur scias, ke mi tiel longan tekston neniam sendis al Vi kiel mian, nur eble transsendis post ricevo de iu alia.

Mi tutkore salutas Vin kaj deziras agrablan Kristnaskon!

**Bogusław Sobol**

## LETERO...

### Prot. EA 228–04

#### Temo: Propono al la tutmonda samideanaro

Tre estimata samidean(in)o, ekde dek jaroj Papo Johano Paŭlo la Dua, je Pasko kaj Kristnasko, aldonas eĉ esperantlingve sian salutmesaĝon al la tuta mondo. Kiam mi estis prezidanto de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) plurfoje mi petis ĝin al la Ŝtatestrekariejo de Vatikano kaj finfine oni konsentis la 3an de aprilo 1994.

Do, ĉi jare okazas la 10–datreveno de la tiu evento tre utila al la E–movado. Ekde tri jaroj oni substrekas la paskan aŭ kristnaskan salutmesaĝojn de la Papo en Placo Sankta Petro per la naŭliteraj paneloj E–S–P–E–R–A–N–T–O, iniciate de S–ro Giovanni CONTI el Milano, kiuj tre trafas la tutmondan televid–spektantaron (ESPERANTO nr. 5/2002, koverto kaj pag. 108 HEROLDO de ESPERANTO nr. 17/2002). Mi esperas ke ankaŭ en la venonta Kristnasko oni aranĝu tian spektaklon.

Tiuokaze, mi proponas ke ni ĉiuj, ĉu je Kristanasko (por la ne–katolikoj kaj alireligianoj mi sciigas ke Kristnasko okazos ĉiam la 25an de decembro) ĉu je Pasko (ĝia dato ŝanĝiĝas ĉiujare), aŭdigu sian dankon per letero, eĉ mallonga, adresita al Lia Eminenco SODANO kard. Angelo, Ŝtatestrekariejo, 00120 CITTÀ DEL VATICANO.

Mi opinias ke se miloj da gratul–

leteroj atingos tiuokaze Vatikano, la jam favora sinteno al Esperanto pliboniĝos. Tiu ĉi iniciato, se ĝi sukcesos, povus fariĝi deirpunkto por pripensi eksperimenton kaj eĉ la adopcion de la neŭtrala lingvo en la katolika Eklezio apoge de la kuraĝa propono farita, dum la Eŭropaj Episkopaj Sinodoj 1991 kaj 1999, de la Ĉefepiskopo de Alba Iulia, Rumanio, D–ro Georgo Jakubinji. Lia Ekscelenco, resume, asertis tute klare ke la katolika Eklezio, ne plu uzante la latinan lingvon, nepre bezonas neŭtralan lingvon Esperanto, ĉar ne eblas diskriminacie preferi en la Liturgio nur kelkajn naciajn lingvojn.

Mi invitas ĉiujn samideanojn, t. e. ĉu la laboristaro kaj intelektularo, ĉu la plenaĝuloj, la junularo kaj infanaro, verki tiun leteron por laŭdi la Ŝtatestrekariejon pro la iniciato de la E–salutmesaĝoj en la du gravaj festoj de la Katolikoj. Sed oni povas mencii kaj gratuli ĝin pro la E–elsendoj de Vatikana Radio trifojese majne, la aprobon de la Meslibro, la oficialan rekonon de IKUE fare de la Pontifika Konsilio por la Laikoj. Tre gravaj historiaj atingoj de IKUE, kiuj pruvas la malfermitecon de la roma eklezio al la planita lingvo kaj samtempe ili favoras la enkondukon de Esperanto en la katolika medio.

Tiu ĉi propono atingu eĉ la samideanojn de aliaj kristanaj kredkonfesioj (Esperanto kiel ekunena lingvo), tiujn de la aliaj religioj (Esperanto por la Interreligia dialogo), la ne–kredantojn kaj la ateistojn. Des pli bone se ili sin deklaras tiaj. Mi ri–

markas denove ke se lavango da esperantlingvaj leteroj el ĉiuj kontinentoj antigos Vatikanon, blovos nova lingva vento ĉe la centro de la katolikaro kun certa influo ankaŭ ĉe la civilaj institucioj.

Kompreneble, neniu forgesu sian adreson. El ĝi la vaticanaj oficistoj divenas la Landon kaj por la respondo ili uzos ĝian nacian lingvon.

Se la kristnaska salut-mesaĝo ne okazos (unufoje dum la dek jaroj tio okazis pro malsaniĝo de la Papo), ni same skribu por substreki la bedaŭrindan mankon kaj ni petu insiste la daŭrigon de la ŝatataj salut-mesaĝoj okaze de venontaj Pasoj kaj Kristnaskoj kaj eĉ okaze, kiel ne, de eksterordinaraj tutmondaj okazintaĵoj.

Mi esperas ke tiu ĉi propono estu ŝatata de la tuta samideanaro kaj mi dankas ĉiujn pro la afabla atento. Samideane salutas kaj bondeziras ĉiujn

**Pastro Duilio Magnani**  
**Viale Carlo Zavagli 73**  
**IT 47900 RIMINI—RN**

## ... kaj unuaj agoj

Kara Sinjoro Redaktoro,

Respondante al la propono de pastro Duilio Magnani el Italio mi skribis al la Ŝtatsekretario kardinalo Sodano en Vatikano la supre sendata al Vi letero. Mi esperas, ke ankaŭ multaj aliaj gesamideanoj skribos simile al la Vatikano.

Elkore mi Vin salutas!

**Boguslavo**

Bogusław Sobol  
ul. Gospodarska 55  
05–822 Milanówek  
Polska – Polonia

Lia Eminenco  
SODANO kard. Angelo  
Ŝtatsekretario  
00120 CITTÁ DEL VATIKANO

Mi deziras esprimi mian grandan dankemon al nia kara Papo Johano Paŭlo la Dua kaj al Vi, Respektinda Eminenco, pro tio, ke dum la Papaj benoj URBI kaj ORBI ĉiam inter aliaj lingvoj estas uzata internacia, neŭtrala lingvo ESPERANTO. Estas tre grava afero, ĉar esperanto estas valora kaj utila lingvo, kiun uzas multaj homoj de la mondo. Ĝi bone servas por la interkompreniĝo inter la popoloj. Ankaŭ okazas esperantaj ekumenaj kongresoj, dum kiuj la partoprenantoj tre facile povas interkompreniĝi. Estas Meslibro en esperanta lingvo aprobata de la Sankta Seĝo, kaj esperantistoj povas partopreni la Sanktajn Mesojn en esperanto dum internaciaj kunvenoj, aranĝoj, kongresoj, kaj ne nur.

En Romo la sidejon havas Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, kaj Radio Vatikano dissendas programojn ankaŭ en esperanto. Ni, esperantistoj tre ĝojas, kiam ni povas laŭdi Dion en unu komprenebla lingvo por ĉiuj kunvenintoj dum la internaciaj renkontiĝoj. Ĉiuj sin reciproke komprenas kaj kune preĝas, kantas, aŭskultas predikojn, partoprenas Diservojn.



## Simboloj de Esperanto—movado tutmonde

Ne ĉiuj esperantistoj konscias ĝustasence la historiajn eventojn, rilatantaj la Esperantajn simbolojn, plenumantaj tiel gravan rolon en la organiza vivo de la tutmonda esperantistaro. En la Esperanta movado funkcias do tri fundamentaj simboloj interligitaj historie kaj ĝenerale konataj al ni. Tamen – ia aro da esperantistoj, aŭ eĉ simpatiantoj de Esperanto ne ĉiam scias bone kaj komprenas bone la sencon de ili.

Mi ŝatus prezenti – laŭ fidindaj fontoj – almenaŭ kelkajn elektitajn infor-



Esperanto estas facila lingvo kaj bone, ke dank' al la Papaj salutoj ĝi disvastiĝas inter la popoloj. Ankaŭ estas bonega propagando, kiam sur la Placo de Sankta Petro oni povas ekvidi la ŝildon: ESPERANTO. Dankon! Dio rekompencu por ĉio.

Mi elkore deziras al la Papo kaj al Vi multajn gracojn de Naskiĝinta Sinjoro Jesuo Kristo kaj benon por ĉiu tago!

Respektplene

**Bogusław Sobol**

mojn pri ĉefaj tri Esperantaj simboloj laŭvice, t.e.:

- la Esperanta standardo – la honora organiza signo,
- la Esperanta himno – „La ESPE-RO”, kaj
- la Esperanta verda stelo – kiel la organiza signo.

### **Kaj jen – la Esperanta standardo (flago).**

Ĝi estis akceptita oficiale dum la unua Universala Kongreso de Esperanto okazinta en la urbo Boulogne-sur-Mer (en Francio), en la jaro 1905.

Inter la aŭtoroj de projektita Esperanta standardo, kiuj prezentis sian projekton dum la Universala Kongreso, ektroviĝis tri bra-vaj esperantistoj kaj fervoruloj de Esperanto:

- d-ro Alfredo Michaux – laŭprofesie advokato kaj estrarano de Esperanto-Grupo en Boulogne-sur-Mer
- d-ro Luciano Sergeant – ankaŭ advokato kaj estrarano de loka Esperanto-Grupo en la sama urbo;
- Maŭrico Duchochois – estro de la sama Esperanto-Grupo en

Boulogne-sur-Mer.

La prezentita tiam projekto de Esperanta standardo montris la verd-koloran tolaĵon ĉirkaŭ du metrojn longa kaj unu metron larĝa; ĉe la left-flanka supra angulo ek troviĝis blanka kvadrato, sur kies centra parto videbliĝas la verd-kolora kvinpinta stelo.

La aŭtoroj de tiu ĉi standard-projekto – vere eminentaj pioniroj de esperantista movado en Francio – plene bonsukcesis ĉi-foje; la prezentita de ili projekto de Esperanta standardo elvokis tiam la spontanecan eĉ aplaŭdon. La prezentitan standardon oni akceptis unuvoĉe. Ekzemple, unu el la alvenintaj kongresanoj – d-ro Ilja Ostrowski – fama kuracisto en la urbo Jaŭta (Rusio), eminenta pioniro de la rusa esperantista movado, ankaŭ ŝatata oratoro, eldiris tiam jenajn vortojn:

„Standardon ni ne serĉu, la standardo – kiu kondukos nin al la venko kaj kiun ni gvidos estonte, kaj kiu flirtos en ĉiuj landoj de la tuta mondo, jam estas ĉi tie! Jen – ĝi jam estas”.

Denove ektondris longedaŭraj aplaŭdoj; de tiam ĝuste – la oficiale akceptita Esperanta standardo – ekkomencis funkcii kiel la ĉefa, vidinda signo de la tutmonda esperantistaro. Ĝia verda koloro signifas laŭsence la esperon, sed ankaŭ la organizan koloron de esperantistoj en la skalo internacia. La 1an Universalan Kongreson de Esperanto en Boulogne-sur-Mer partoprenis entute 688 esperantistoj – kongresanoj de la tuta mondo.

Tre interesa estas ankaŭ la fak-

to, ke d-ro L. L. Zamenhof – kreinto de Esperanto, subskribis propramane du Esperantajn standardojn, el inter kiuj unu troviĝas en la Internacia Muzeo de Esperanto, kiel la plej grava historia memoraĵo, inda rigardi ĝin propraokule kaj admiri. La sidejo de la supre nomita Muzeo troviĝas en la imperiestra Palaco Hofburg en Vieno, sur la tria etaĝo. Tiu ĉi vizitinda Muzeo plenumas samtempe gravan edukan rolon por ĉiuj vizitantoj – esperantistoj kaj eĉ simpatiantoj de Esperanto.

### **La Esperanta himno – „La Espero”**

La himno iĝis la dua laŭvice grava Esperanta simbolo de la tutmonda esperantistaro, kies historio estas vere unika siaspece kaj tre interesa.

La vortoj de la himno devenas rekte de d-ro L. L. Zamenhof, aŭtoro de tiu ĉi 24-versa poemo s. t. „La Espero”, kiu iĝis baldaŭe tre populara kaj ŝatata en la skalo internacia.

La muzikon al tiu ĉi poemo – kiel Esperanta himno – komponis Feliciano de Menil – barono, estinta konsulo de Francio kaj fama muzikkomponisto. Li naskiĝis en 1860 j. kaj esperantistiĝis en 1901 j.; aŭtoro de multaj artikoloj pri Esperanto, la ĉefredaktoro de Esperanta gazeto „La Revuo”, aŭtoro de multaj kantoj, ankaŭ de „Muzika terminaro”, eldonita tiam unuan fojon en Francio kiel faka vortaro.

Lia belsonanta muziko iĝis vigla, plaĉa kaj tre populara kaj ĝi prezentas tipe francan temperamenton,

oni ŝatus diri; ĝi funkcias do, dum la inaŭguraj partoj de Esperantaj kongresoj universalaj, landaj, kaj aliaj pli gravaj poresperantaj aranĝoj; ĝi estas ludata kaj kantata ĉiam fervore, kun ofta spontaneco.

Sed tamen – oni devas scii, ke tiu ĉi belsonanta muziko ne estis la unua en la historio de Esperanta himno.

Do – la unua muzik-komponisto kiu verkis la muzikon por Esperanta himno – „La Espero” – estas laŭfakte svedo, nome Cleas Adelskjöld, naskiĝinta en 1824 j., membro de la Reĝa Akademio de Sciencoj en Ŝtokholmo (Svedio). Sian muzik-verkon li prezentis ĉekomence al la Kongreso de l’ Paco, okazinta en Romo – 1891 j., disdonante muziknotojn al ĉiuj kongresanoj, por esplori kaj sondi samtempe, kiel ekplaĉos la muziko destinita por Esperanta himno. Tiu ĉi prezentado vere bonsukcesis; dum la menciita kongreso oni akceptis la muzikon kun granda aplaŭdo kaj rekono, esprimante gratulvortojn al ties komponisto. Raportis pri tiu ĉi evento la Esperanta gazeto „La Esperantisto”, n-ro 1/1892 j.

Dum longa tempo – de pli ol 14 jaroj – oni uzis tiun ĉi muzikon (de Cleas Adelskjöld), kiel la oficialan por Esperanta himno „La Espero”. La muziko funkciis efektive ĝis la jaro 1905. Intertempe – laŭ propono de licea profesoro Renè Deshays, ankaŭ muzikisto, oni komencis uzi la saman muzikon al la alia poemo de d-ro L. L. Zamenhof – „La Vojo”, traktata ĉekomence kiel la neoficiala Esperanta himno; kaj d-ro L. L. Zamenhof

mem eĉ pli preferis sian poemon „La Vojo”, ol la poemon – „La Espero”.

Mi rememorigu ĉi-momente almenaŭ unuajn strofojn, rememore de tiuj ĉi ambaŭ poemoj, tiel vaste famiĝintaj tutmonde, por kompari la tekstojn.

Jen „La Espero”, aktuale funkcianta kiel Esperanta himno:

*En la mondon venis nova sento,  
Tra la mondo iras forta voko;  
Per flugiloj de facila vento –  
Nun de loko flugu ĝi al loko.*

*Ke al glavo sangon soifanta  
Ĝi la homan tiras familion;  
Al la mond’ eterne militanta  
Ĝi promesas sanktan harmonion.  
[...]*

Jen „La Vojo”, tute same ŝatata poemo, traktata ĉekomence kvazaŭ neoficiala Esperanta himno:

*Tra densa mallumo briletas la celo,  
Al kiu kuraĝe ni iras.  
Simile al stelo en nokta ĉielo,  
Al ni – la direkton ĝi diras.*

*Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj;  
Nek batoj de l’ sorto, nek moko de l’  
homoj,  
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita  
Ĝi estas la voj’ elektita. [...]*

Kaj kio okazis do? Dum la 1a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Boulogne-sur-Mer 1905 j., oni prezentis tiam ambaŭ muzikojn por Esperanta himno – „La Espero” – tiun de Cleas Adelskjöld, kiel la unua



muziko, kaj sekve – la muzikon de Feliciano de Menil – kiel la dua muziko laŭvice, celante la definitivan elekton de unu el la proponitaj muzikoj, pere de oficiala voĉdonado fare de alvenintaj kongresanoj.

Sed tamen – neniu el la proponitaj muzikoj sukcesis plimulton da voĉoj; voĉdonis tiam 50 procentoj da konservativuloj – adorantoj de la muziko de Cleas Adelskjöld, kaj precize 50 procentoj da progresantoj – adorantoj de la muziko de Feliciano de Menil; ekestis do la remisa finrezulto. Tiukaze oni ekproponis prokrastigi la voĉdonadon tiucele dum la 2a Universala Kongreso de Esperanto okazonta sekvontjare – 1906 – en la urbo Ĝenevo (Svislando). Sed ankaŭ tie ĉi – en Ĝenevo – kie la kongreson partoprenis 1200 esperantistoj de la tuta mondo, la okazinta voĉdonado sukcesis tute la saman finrezulton, t. e. 50 procentoj da kongresanoj kontraŭ 50 procentoj da voĉdonantoj. Ankaŭ tie – en Ĝenevo – oni decidis denove prokrastigi la voĉdonadon ĝis la 3a laŭvice Universala Kongreso de Esperanto okazonta sekvontan jaron – 1907 – en la angla urbo Cambridge. La kongreson partoprenis tie pli ol 1300 da esperantistoj–kongresanoj.

En Cambridge estis organizita tiam (1907 j.) la solena popola festeno por loka loĝantaro kaj alvenintaj esperantistoj. Loka Kongresa Komitato (LKK) eluzis la okazon kaj prezentis publike ambaŭ muzikojn, proponitaj por Esperanta himno – „La Espero”. Okazis do la proklamita tiu-

cele plebiscito inter loka loĝantaro. Efektive, ambaŭ muzikoj ekplaĉis; sed post longaj prikonsideroj oni aplaŭdis pli kaj elektis finfine – kiel la pli plaĉan – la muzikon de Feliciano de Menil. Tiu ĉi plebiscita finrezulto estis do unuvoĉe akceptita dum la 2a Universala Kongreso de Esperanto en Cambridge kaj de tiam ĝuste ĝi fariĝis la oficiala muziko por Esperanta himno – „La Espero”, eniranta en la tutan mondon kaj funkcia sukcesplene ĝis nun, depost la 1907 jaro.

Verŝajne la populara kaj ankaŭ ŝatata muziko de Cleas Adelskjöld restis ĉe la dua Zamenhofa poemo s. t. „La Vojo”, kiun oni konsideris ĉekomence kvazaŭ neoficialan Esperantan himnon.

### **La esperanta Verda Stelo – la tria laŭvice grava simbolo**

Ĝi funkcias ĝis nun, kiel la organiza signo de la tutmonda esperantistaro; ĝi prezentiĝas kiel la kvin–pinta verda stelo, simbolanta kvin kontinentojn de la mondo. La verda koloro simbolas la esperon laŭtradicie, kaj ankaŭ la organizan koloron de esperantista movado en la skalo internacia; en ties centra parto videbliĝas litero „E”, kio signifas – Esperanto.

La Esperanta verda stelo kiel la organiza signo estas tiel same malnova, kiel la lingvo Esperanto mem. Jam ĉekomence difinis ĝin d–ro L. L. Zamenhof – kreinto de Esperanto.

Surbaze de tiu ĉi modelo, la Esperanta stelo aperis ĉekomence presforme sur titolpaĝoj de diver-

saj Esperantaj eldonaĵoj, krom la diversformaj insignoj; ekz. UEA-anoj (membroj de la Universala Esperanto-Asocio) uzas la verdan stelon kun literoj UEA, anstataŭ litero „E”; katolikoj uzas la stelon kun eta kruceto anstataŭ litero „E”; SAT-anoj (membroj de la Sennacieca Asocio Tutmonda) uzas la stelon kun literoj SAT; fervojistoj-esperantistoj uzas la stelon kun literoj IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio); skoltoj-esperantistoj uzas la stelon kun literoj SEL (Skolta Esperanto-Ligo); veteranoj kaj senjoroj-esperantistoj uzas la stelon kun literoj VEK (Veterana Esperanto-Klubo); socialistoj-esperantistoj uzas la verdan stelon, ĉirkaŭita per la ruĝkolora konturo, aŭ la stelon sur la ruĝa fono, anstataŭ blanka, ktp.

Diversigitaj estas ankaŭ la formoj de Esperantaj insignoj kun la verdaj steloj, uzataj libere kiel la organizaj insignoj rondformaj, pentagonaj, aŭ enforme de ornamaj rozetoj, ornambroŝoj, fingro-ringoj, orelringoj, kolieroj, k.a. Vere, nekalkuleblaj estas variaĵoj de la Esperantaj insignoj tutmonde; oni trovas ankaŭ la Esperantajn stelojn kun la portretbildo de d-ro L. L. Zamenhof, anstataŭ litero „E”.

La Esperantaj stelojn oni trovas kun diversaj porokazaj motivoj dum la kongresoj – universalaj, landaj, fakaj, internaciaj konferencoj, feriadoj kaj amikaj renkontiĝoj. La verdaj steloj estas ofte kompilitaj kun la naciaj flagetoj; faritaj plejparte el metalo kaj glazuritaj diverskoloro. Postmilite –

ekregis la plastikaj Esperantaj insignoj diversformaj.

Indas mencii ekz. pri Esperantaj insignoj de Krakovo. Dum la 8a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Krakovo – 1912 j. (unuan fojon sur polaj teritorioj), oni uzis i.a. la Esperantan verdan stelon (sur afiŝoj), kun tiel nomata „hirunda vosto”, aspektanta kvazaŭ kometo kaj prezentanta tiam la polajn naciajn kolorojn: blank-ruĝajn; ankaŭ enforme de ĉielarko.

Apartan atenton meritas la kongresa insigno; ĝi prezentiĝas kiel la bronza medaliono pendigita sur diverskolora kokardeto, la medaliono prezentis la virinan silueton, sidanta sur la terglobo kaj tenanta en la manoj – super la kapo – la Esperantan verdan stelon kun radioj; la medalionon projektis krakova artisto-skulptisto Henryk Kunzek. Sed tamen la kokardetoj estis diversigitaj laŭkoloro; la verdan kokardeton uzis nur la eksterlandaj esperantistoj; sekve, la blank-ruĝan kokardeton uzis nur polaj esperantistoj de diversaj regionoj (krom la urbo Krakovo) kaj la blank-blujn kokardetojn uzis tiam nur krakovaj esperantistoj, el inter kiuj multaj plenumis tiam la rolon de ĉiĉerono dum vizitado de malnova krakova urbocentro, ktp. Ege interesa organiza ekzemplo, permesanta diskonigi kongresanojn – kiu estas kiu – kaj neniam plu ripetanta maniero dum la postsekvintaj Universalaj Kongresoj de Esperanto.

Dum kelkaj unuaj Universalaj Kongresoj de Esperanto oni uzis la stele-

tojn provizore preparitajn; informas pri tio i. a. Aleksander Brzostowski – bibliotekisto, ĵurnalisto kaj meritinta pioniro de varsovia Esperanto-movado antaŭ la jardekoj, kiu posedis ankaŭ la provizoran Esperantan steleton, kiun portis d-ro L. L. Zamenhof.

Sur la paĝoj de la Esperanta gazeto „La Esperantisto” n-ro 181/1892 j. oni legas i.a. jenan informon:

– s-ano B. G. Johnson de urbo Östersund proponas, ke ĉiuj esperantistoj uzu la difinitan modelon de Esperanta stelo (insigno), helpe de kiu oni povus pli facile interkoniĝi dum la kongresoj, konferencoj kaj aliaj aranĝoj;

– Georgij Rjabin – rusa pioniro de Esperanta movado proponis, ke la Esperanta insigno estu rondforma, kun verda stelo, sur blanka fono, de 2–3 centimetra dimensio;

– Pierre Deullin proponis tute simplan, verdan steleton el kiu ajn materialo, kun la surskribo: Esperanto, aŭ Ligo Esperantista; k.a.

Revenante al Krakovo necesas aldoni, ke postmilite en 1956 j. oni uzis la jubilean Esperantan steleton ĉirkaŭita per laŭro-krono, rememoriganta la 50-jaran jubileon de Esperanto en Krakovo; sekve en la jaro 1958, dum la 15a Tutpollanda Kongreso de Esperanto okazinta septembre en Krakovo, oni pretigis grandan Esperantan stelon sur la blank-kolora rondforma plato de pli ol unumetra dimensio, posedanta la grandliteran surskribon – ESPE-RANTO en la centra parto de la

stelo. Inter la stel-pintoj ektroviĝis krom-vortoj aldone al la vorto ESPE-RANTO, ekz.:

**Esperanto**  
FELIĈIGAS INFANOJN  
AMIKIGAS MONDANOJN  
SERVAS AL LA PACO  
HELPAS LERNI LINGVOJN  
KONGRESOJN FACILIGAS.

La stelo vekis tre grandan interesiĝon en krakova medio ne nur inter la kongresanoj kaj lokaj esperantistoj; ĝi estis lokigita pli poste (post la kongreso) sur la fronta muro de loka Esperanto-Klubo de Krakovo, ĉe la strato S-ta Kruco 1; ĝi estis prezentita krome dum diversaj, pli gravaj Esperantaj aranĝoj en Krakovo; oni diskonigis ĝin krome dum diversaj junularaj aranĝoj poresperantaj en Bulgario, tiama Ĉeĥoslovakio, Francio, Nederlando, kaj eĉ en Japanio. S-ino Marjorie Boulton – eminenta brita verkistino, poetino kaj esperantistino, nomis tiun ĉi stelon „la inspira stelo de Krakovo”, kies fotobildon kaj informan noton oni publikigis sur la paĝoj de la revuoj „Esperanto” kaj „Heroldo de Esperanto.

Tiamaniere ankaŭ Krakovo kontribuis iasence por pliriĉigi la historion de la Esperanta verda stelo.

Tiel do prezentiĝas tri plej gravaj Esperantaj simboloj en la organiza vivo de la tutmonda esperantistaro, kion oni decas konservi en la memoro de ĉiuj esperantistoj kaj simpatiantoj de Esperanto.

**Krakovo, decembre 2004 j.**

## **Raporto pri XXII Esperantaj Tagoj en Krakovo**

La 11an kaj 12an de decembro 2004 renkontiĝis kun krakovaj gesperantistoj samideanoj el la tuta Esperantujo por kunesti kaj omaĝi la 145an datrevenon de la naskiĝo de la Majstro Ludoviko L. Zamenhof (\* 15.12.1859). La aranĝon inaŭguris la E-Himno kaj la prelego de Mariano Kostecki pri Esperantaj simboloj – tiel gravaj por nia esperantista komunumo. Enkadre de tre riĉa programo je la demando: „Kiel plej efike profiti ambaŭ cerbajn hemisferojn?” respondadis en sia elpaŝo Dorota Szczygieł. Kiel laŭvica preleganto elpaŝis la ĉefredaktoro de la katolikisma Esperanto-revuo FRATECO – pastro Stanislavo Płachta el Krakovo. Tuj post li pri la revuo de polaj esperantistoj – POLA ESPERANTISTO, ĉefredaktoro Kazimierz Leja. Ambaŭ ĉefredaktoroj volontigadis aŭskultantojn aboni, reaboni, legi kaj kunverki la menciitajn revuojn – por povi regule pliperfektigadi en la lingvoscipovo de Esperanto. Enkadre de la prirevua temaro prelegis ankaŭ Stanislao Śmigielski, provante respondi je la demando: „Kial ni devus aboni MONATON?”. Aŭskultantoj

ricevis foliojn kun aboniloj de Monato-revuo kaj provekzemplerojn de tiu monata internacia revuo. La preleganto ankaŭ volontigadis aŭskultantojn aboni tiun revuon perrete aŭ permonuje kaj pli frue decidi pri la abono perĥemisfere.

Sabate posttagmeze, Urszula Zybura – poetino kaj aforistino, legis siajn vortajn perletojn – aforismojn nuntempigitajn, ĝojigante aŭskultantojn kaj ĝojante mem pri aplaŭdegoj de aŭskultantoj. Akompanis por ŝi junulo – Joaĥimo Kołpanowicz.

Enkadre de la planita de la organizantoj distro Urszula Giercarz pianlude volontigis kantemulojn amuziĝi per komuna kantado kaj inter alie per la kanto: „El fama urb, Krakovo” kaj per aliaj same belaj.

Post la kantado ankoraŭ tri emimentuloj tre interese okupigis kunvenintojn per la poeziaj temoj. Anna Ramza-Radłowska siluetigis la forpasintan nunjare kaj entombigitan en subterejoj de la preĝejo Skałka en Krakovo – Nobel-Premiitan poeton Czesław Miłosz. Ŝi montris la omaĝon de esperantistoj al tiu emi-

nenta verkisto.

Ŝatantoj de la Esperanto-poezio havis la okazon renkonti ankaŭ kun la alia esperantisto verkanta – Andreo Feuer, kiu montradis mnemoteknikajn versaĵetojn, kiel ilojn por ekinteresi lernantojn de Esperanto pri la kreipova forteco de tiu lingva pensilo. La konata ĉefino de la pola sekcio de ILEI – Maria Majerczak diskutrondem montris la poezion de la nuntempa poeto Poul Thorse. Diskuti pri la Esperanto-poezio en Esperanto ne estas eble tro facile, tamen la poeziaĵo titolita: „Kvalifikoj neneceŝaj” kuraĝigis rondanojn kompletigi tiun poezion per siaj vortoj, do kunvortigi kun la majstro Poul. Iom malfrue vespere anime profundigadis samideanojn dum la vera muzika koncerto la Ensemblo „Fiesta Inka”. Tiu gevara ensemblo dancis laŭ la kutimo de Inkoj-popolo, kantis en la lingvoj de Inkoj kaj de Suda Ameriko kaj ludis per instrumentoj popolaj el Andoj-montaro. La muzika regalo de la ensemblo Festo de Inkoj estis aplaŭdita, kiel ŝajnis, senfine.

La duan Esperanto-Tagon, dimanĉe, ĉiuj kune kun novaliĝintoj renkontiĝis en la fama krakova kafejo „Mihalikova Kaverno” (Jama Michalikowa), kie ankaŭ tro rapide, kiel ĉiam inter geamikoj, pasadis tempo. Ĉe la bongusta kaverna kafo kaj la „mihalika” tortokuko oni dum pli ol 60 minutoj aŭskultis la muzikan regalon – la koncerton de la gitara ludo de la famkonata Majstro Jan OBERBEK.

Je la temo: „La Kaverno de Michalik kaj la pola modernismo” sciencni-

vele en la belsonanta Esperanto prelegis Lidia Ligęza – la koro de la Krakova Societo Esperanto – organizanto de laŭvicaj Esperantaj Tagoj en la reĝa apudvistula urbo de Krak.

Ĉe la, en amika etoso daŭranta, kafumado, pri la fame konataj mielkukoj el la urbo Toruń, rakontis Teresa Nemere.

Ŝi disdonis ankaŭ al aŭskultantoj la torunajn spikkukojn kaj ekinstruis „Spikkukan kanton” – komenciĝantan per la vortoj: „Do, kaptu la kukon, ho ĉiu bonul’...”.

Posttagmeze en la historia preĝejo de Sankta Vojteŝo (Adalberto) sur la ĉefa placo de Krakovo (Rynek Główny) estis kuncelebrita la sankta meso romkatolika. La meson celebris kune du pastroj – Stanislavo Płachta el Krakovo kaj Jozefo Zielonka el Tarnovo. La predikon eldiris sacerdoto Josefo. Fideluloj-verdstelanoj preĝis inter alie por la sano kaj Dia beno por la alia krakovano – la Sankta Patro Johano Paŭlo II, kiu dum la papa beno „Por Urbo kaj por Mondo” salutas verdstelanojn en Esperanto.

Delegacio de la kunvenintoj metis florbukedon kun la verda steleto omaĝe al Majstro Ludoviko sub la memortabulo ĉe la krakova Zamenhof-Strato.

Travivinte du tro rapide pasintajn tagojn – Esperantajn Tagojn de Krakovo, ĉiuj alilokanoj revenis hejmen certe plenigitaj per belegaj travivaĵoj. Oni povis pliriĉigi sian lingvoscipovon, amikiĝi kun la esperanta kaj esperantlingva poezio kaj amikiĝi kun

la gastama krakova etoso de la gekrakovanoj – geesperantistoj.

La krakova gesperantistaro kiu pri-laboris kaj pretigis bonajn kondiĉojn por la partoprenantoj de tiu esperantista rendezuo meritas korajn aplaŭdojn kaj sincerajn dankojn. La samajn korajn dankojn meritas Direkcio de la Kulturdomo „Podgórze” kiu jam multfoje gastame akceptis kunvenantajn el Esperantujo samideanojn.

**KORAN DANKON!**

Vivu la Krakova Verda Stelo!

**Partoprenanto de la  
XXII Esperantaj Tagoj de Krakovo  
Stanisław Śmigielski**

## Tago de E-libro

Okaze de la Tago de E-libro la 15an de decembro 2004 oni malfermis libroekspozicion en Esperanto-Societo FLAMO en Toruń. Oni prezentis 120 Esperanto-librojn kaj pollingvajjn pri Esperanto kaj ankaŭ kelkajn anglajn, kiuj enhavas esperantlingvajjn resumojn. Inter la Esperantaj libroj videblis i.a. antologioj, vortaroj kun PIV kaj literaturaj libroj, ekz. Hamleto de Shakespeare, Sinjoro Tadeo de Adam Mickiewicz. Ankaŭ informaj libroj kiel Enciklopedio de Esperanto (de 1933 j.), Informilo pri E-movado, Jarlibroj de UEA, k.m.a. En la ekspozicio eblis vidi ankaŭ ĉiuj 34 libroj kaj broŝuroj, eldonitaj de FLAMO, kun la plej freŝa eldonaĵo, nome la verkaĵlibro de Eu-

geniusz Matkowski.

Loka ĉiutaga gazeto „Nowości” (Novaĵoj) ricevis la sciigon pri la ekspozicio por pli vasta informado.

**Urszula Adamska**

## Oblata renkontiĝo en Varsovio

La 15an de januaro 2005 okazis en la Klubo de Katolika Intelektularo en Varsovio oblata renkontiĝo. La aranĝon partoprenis multaj gesamideanoj el Varsovio kaj el aliaj lokoj.

Komence pastro Roman Forycki celebris la sanktan meson en Esperanto.

Poste okazis tre interesa kaj bela arta programo de profesiaj kantistoj kaj artistoj. Ili kantis kristnaskajn kaj aliajn kantojn, recitis la poemojn de diversaj polaj poetoj, parolis pri la temoj ligitaj kun Kristnasko, historio de kristnaskaj kantoj ktp.

Post la arta programo la partoprenantoj translokiĝis al alia salono, kie atendis jam tabloj kun kuketoj, trinkaĵoj ktp. Komence pastro Forycki preĝis kaj benis la blankan oblaton kaj poste ĉiuj prenis ĝin, rompis kaj bondeziris unu al alia.

En agrabla etoso dum la rememoroj, interparoloj, manĝado de kuketoj kaj aŭskulto de kristnaskaj poemoj en Esperanto la partoprenantoj pasigis en la klubo kelkajn horojn.

**Bogusław Sobol**

## Nova estraro PEA Szczecin

Estimata sinjoro!

Okaze de NOVA JARO 2005, la nova estraro en Szczecina PEA deziras al vi kaj al ĉiuj kunlaborantaj redaktoroj de „Pola Esperanlisto” la plej bonan la plej fruktodonan laboron por kontentigi ĉiujn gesamideanojn.

Dum la kunsido estis elektita nova 5-persona *Estraro* de PEA en Szczecin:

1. Lidia Bogusz – Prezidantino  
rete: Lidabog@poczta.onet.pl
2. Elżbieta Sosulska – Vic-Prezidantino /sekretario
3. Regina Kwiatkowska – kasistino
4. Eugenia Pach – Membro/libroteknistino
5. Marian Koziarz – Membro/kronikisto /turismo

*Reviza Komisiono:*

1. Maria Jackowska – Prezidantino
2. Irena Tomaszewska – Membro
3. Bronisława Hadrzyńska – Membro

*Delegito por Enlanda Kunveno:*

1. Maria Jackowska – Delegito
2. Lidia Bogusz – Delegito (laŭ bezono).

Kun amika saluto

**Lidia Bogusz**

Nia adreso:

Polski Związek Esperantystów  
Pola Esperanto-Asocio  
skr. poczt. 3  
70-428 Szczecin 3

## La 25a Internacia Renkontiĝo de Popolaj Orkestroj *Muziko de eŭropaj nacioj* Toruń, 10–12.06.2005

Etnografia Muzeo en Toruń (norda Pollando) organizas la 25an Internacian Renkontiĝon de Popolaj Orkestroj uzante Esperanton kiel helplingvon dum kontaktoj kun eksterlandaj muzikgrupoj. La aranĝo okazos de la 10a ĝis la 12a de junio 2005.

La Renkontiĝo ne estas konkurso. La aranĝo havas karakteron de popolmuzika festo kaj komuna amuzado, dum kiu ni volas prezenti diversajn manierojn de tradicia muzikado de la diversaj nacioj el Eŭropo. Ni invitas kune 10 ensemblojn el Pollando kaj el eksterlando.

Nian aranĝon povas partopreni **tradiciaj popolorkestroj** uzantaj tipajn instrumentojn kune kun kantistoj kaj kun danĉparo, kiu povos prezenti karakterizajn regionajn dancojn. La grupo prezentigas en popolvestoj.

Dum la koncertoj la publiko per voĉdonado elektos **la plej simpattian** ensemblon kaj solistojn: kantiston, instrumentiston, danciston aŭ danĉaron.

La programo antaŭvidas la koncertojn en muzea amfiteatro kaj en Etnografia Parko, muzikadon sur la stratoj de Malnova Urbo, kaj specialan koncerton por lernejoj (vendrede, 10.00). Por tiu lerneja koncerto ni petas prepari programerojn

konvenantajn por infanoj (kantoj kun dancoj, popolaj ludoj k.t.p.)

### **Kondiĉoj de la partopreno:**

1. La ensemblo (kun esperantisto–interpretisto kaj kun ŝoforo) ne povas esti pli ol 12 persona;

2. La ensemblo venas kun esperantisto–interpretisto, kiu pere de Esperanto kontaktiĝas kun organizantoj;

3. La vojaĝkostojn la partoprenantoj pagas mem;

4. La organizantoj garantias nokton kaj manĝigadon de la vespermanĝo (ĵaudo) la 9an de junio ĝis la matenmanĝo (lundo) la 13an de junio 2005.

5. La ensemblo devas sendi al Muzeo anoncilon kun foto de ensemblo ĝis la fino de februaro 2005.

La organizantoj elektos la ensemblojn laŭ vico de anoncoj kaj proponata programo. La akceptotaj ensembloj tuj ricevos oficialan invitilon kaj precizan programon.

Muzeo rezervas por si rajton registri (foto, aŭdio, video) la programon de ĉiu ensemblo por la dokumentado kaj reklamo.

### **Adreso por kontakto:**

S–ino Maria Pokrzywnicka  
retpoŝto: mariapok@op.pl  
Etnografia Muzeo en Toruń  
Wały gen. Sikorskiego 19  
87–100 Toruń, POLLANDO  
tel.: (+48 56) 622 289 43,  
fakso: (+48 56) 62 289 44  
retpoŝto: mettorun@poczta.fm

## **Interreto**

### **Koszalin**

Sendante hodiaŭ en almetaĵo novan lingvan materialon por PE mi samtempe sciigas vin, ke Pola Esperanto–Asocio, Filio en Koszalin, havas jam propran retejon kun multaj interesaj informoj kaj fotoj, troviĝantaj sur 13 paĝoj.

Vizitante ĉiujn paĝojn de nia retejo oni povas trovi ankaŭ INFORMILON pri la 27a Ĉebalta Esperantista Printempo.

Mi kore kaj amike dankas vin, pro aldonado de nia ĈEP–informilo al ĉiu ekzemplero de la lasta numero de Pola Esperantisto.

Kun granda plezuro mi sciigas vin, ke nia nova retejo havas jenan adreson: [www.esperanto.koszalinskie.info](http://www.esperanto.koszalinskie.info)

Mi esperas, ke vi ankaŭ informos ĉiujn legantojn de PE pri nia nova retejo, prilaborita de mi ĉi–monate.

Dezirante al vi pluan fruktodonan, poresperantan agadon mi samtempe kore kaj samideane salutas vin.

**Czesław Baranowski**

### **Vroclavo**

Jen la adreso de nova esperantlingva retejo el Vroclavo:

[www.kanzonamikaro.worsten.org](http://www.kanzonamikaro.worsten.org)

Do, nun la kompleto de la adresoj de esperantlingvaj retejoj el Vroclavo (esperantistaj kaj genealogiaj en Esperanto) estas jena (sube):

Redaktitaj fare de Edward Wojtkowski



## Preskaŭ ĉio pri la prepozicio „DA”

La prepozicio **da** (iomete parenca al **de**) estas sufiĉe ofte uzata por indiki precizan aŭ neprecizan, sed ĉiam gramatike nedefinitan kvanton, nomb-ron, mezuron, pezon de io. Por uzi **da** ni memoru pri jena regulo: **la antaŭa esprimo devas montri kvanton, kaj la posta esprimo devas esti nelimi-gita**. Ekz.: Ŝi petas glason **da** akvo (glason plenan de akvo). La vorto glaso montras kvanton, ĉar ĝi respondas la demandon: „**kiom multe da akvo?**” Se ŝi petus glason **de** akvo, ŝi ricevus glason tute malplenan, bezonatan por trin-



[www.europonto.org](http://www.europonto.org)  
[www.alleum.org](http://www.alleum.org), [www.worsten.org](http://www.worsten.org)  
[www.radikaro.worsten.org](http://www.radikaro.worsten.org)  
[www.gento.worsten.org](http://www.gento.worsten.org)  
[www.free.ngo.pl/europonto](http://www.free.ngo.pl/europonto)  
[www.free.ngo.pl/gento](http://www.free.ngo.pl/gento)  
[www.free.ngo.pl/alleum](http://www.free.ngo.pl/alleum)  
[www.free.ngo.pl/worsten](http://www.free.ngo.pl/worsten)  
[www.wroclaw.dialog.net.pl/praulo](http://www.wroclaw.dialog.net.pl/praulo)  
[www.kanzonamikaro.worsten.org](http://www.kanzonamikaro.worsten.org)  
Redaktita fare Paulo Preŝ  
[www.republika.pl/vroclavo](http://www.republika.pl/vroclavo)

**Bogdan Dembiec**

### Varsovio

Esperanto-Teatro ESPERO de Jerzy Fornal daŭre aktivas en Art-Galerio „Nusantara” str. Nowogrodzka 18a, kaj invitas ĉiujn al siaj spektakloj:

kloj:

**7 III** Virino – kvar bildoj, poezi-  
muzik-pantomima teatraĵo, konsi-  
stanta el poemoj de E. Mieželajtis,  
B. Leśmian, F. G. Lorka, S. Jesienin,  
P. Corneille, W. Auld, reĝo Salomono.

**4 IV** La Jubileo, de Zofia Banet-  
Fornalowa kaj H. Brown. Teatraĵo  
dediĉita al la centjariĝo de Esperanto-  
teatro. Enscenigis J. F., reĝisoro kon-  
sulato de Zbigniew Bogdański.

**2 V** *Vagabondo*, de Harold  
Brown.

**7 VI** *Apologio de Sokrato*, laŭ Pla-  
tono.

Antaŭ spektakloj kutime okazas  
konversacia rondo pri la Esperanto-  
kulturo kaj enkonduko al la spek-  
takloj, kiujn gvidas Zofia Banet-  
Fornalowa.



ki akvon.

**Luj esprimoj havas ĉiam kvantan signifon:** multe **da** aŭtoj, malmulte **da** homoj, iom **da** neĝo, tiom **da** problemoj, kelke **da** akcidentoj, granda kvanto **da** frakasajoj.

**Aliaj esprimoj havas aŭ ne havas kvantan signifon** (laŭ intenco de parolanto). Ekz.: Venis grupo **da** esperantistoj. (**Kiom da** esperantistoj venis?); Ĝi estas grupo **de** esperantistoj. (**Kia** grupo ĝi estas?); Li volas aĉeti bukedon **da** rozoj. (**Kiom da** rozoj li volas aĉeti?); Ili volas aĉeti bukedon **de** rozoj. (**Kian** bukedon ili volas aĉeti?)

### **La kvanto (nombro, mezuro, pezo) povas esti:**

- **precize difinita:** miliono **da** loĝantoj, deko **da** jaroj (jardeko), milo **da** jaroj (jarmilo), kilogramo **da** sukero, litro **da** lakto, kvintalo **da** terpomoj, dekduo **da** citronoj, dek paĝoj **da** teksto, paro **da** gantoj, tridek jaroj **da** pedagogia laboro, kvaropo **da** asoj; **da** ĉevaloj ili havis 12 (la kvanton difinas simpla numeralo),
- **proksimuma:** plenmano **da** bombonoj, glaseto **da** vino, botelo **da** suko, guto **da** roso, skatolo **da** prempingloj, sako **da** ruĝbetoj, kartono **da** piroteknikaĵoj, garbo **da** pajlo (greno), sitelo **da** sablo, vagono **da** karbo, tubo **da** dentopasto.

- **malpreciza, montranta malgrandan kvanton:**

Donu al mi iom **da** pano. Tiom **da** problemoj homoj havis neniam. Kelke **da** lernantoj ricevis stipendion. Pli **da** mono, pli **da** plezuro. Grupo **da** naĝistoj venis Mielnon. Bando **da** huliganoj detruis bushaltejon. Policistoj punis nur parton **da** stratulaĉoj. Rapide fluas jaroj **da** vivo. Antaŭ ni etendiĝis pece **da** lago. Karavano **da** turistoj venis al Zakopane.

- **malpreciza, montranta grandan kvanton:**

Ĉe vojo kuŝis aro **da** dehakitaj arboj. En montara regiono estas amaso **da** neĝo. La mitingon en Kievo partoprenis multe **da** homoj. Oni neniam havas tro **da** singardo. Vintre videblas ofte nubo **da** korvoj. Nubo **da** ĉagreno kovris lian frunton. Torento **da** vortoj fluis el lia buŝo. Li fortrinkis jam maron **da** biero. Fiŝkaptistoj renkontis benkon **da** haringoj (haringobenkon). Lavango **da** mensogoj ruliĝas tra la mondo.

### **Rimarko 1**

Inter grupo **da** soldatoj kaj grupo **de** soldatoj estas tiu diferenco, ke la unua respondas la demandon: **kiom multe da soldatoj?** dum la dua montras la konsiston (kvaliton) kaj respondas la demandon: **kiaspeca tiu grupo?**

**Vico da klientoj** – elvokas bildon de la klientoj aranĝitaj en vico, dum **vico de klientoj** elvokas precipe bildon **de** vico, konsistanta el klientoj (klarigo en Plena Analiza Gramatiko).

## Rimarko 2

Nombraj vortetoj aperas normale sen **da** kiel rekta priskribo de ĉefvorto. Ekz.: Li havas **cent** pomarbojn en sia ĝardeno. Mi havas hejme **dek** valorajn librojn en la lingvo internacia. Mielno havas **kvin mil** loĝantojn.

**Sed:** nombrovorto kun **o**-finaĵo aperas kiel ĉefvorto kun **da**-esprimo. Ekz.: Li havas centon **da** pomarboj. Mi havas dekon **da** valoraj libroj. Vizitata de ni urbo havis milionon **da** loĝantoj. Tiu ĉi rivero havas 294 kilometrojn **da** longo (Z).

## Rimarko 3

La kvantaj adjektivoj: **kelka, multa, malmulta, pluraj** povas havi la duan formon, konsistantan el adverba finaĵo kun **da**: **multaj homoj** (= diversaj homoj, ĉiu aparte) kaj **multe da homoj** (= ĉiuj kune). Ni memoru, ke **multe da** ĉiam esprimas kunecon.

**Jen aliaj ekzemploj kun kvantaj adjektivoj:**

Permesu diri al mi **kelke da** vortoj (kelkajn vortojn). Ŝi kuris **kelke da** metroj (kelkajn metrojn). Li donis al ŝi **kelke da** rozoj (kelkajn rozojn).

## Rimarko 4

Kiel kvantaj adjektivoj funkcias laŭ sia senco ankaŭ la formoj: **kiom da, tiom da, iom da, ĉiom da, neniom da**, ekz.: Kiom **da** lingvoj vi parolas? Kiom **da** jaroj vi havas? Kiom **da** tagoj formas superjaron? Kiom **da** kapoj tiom **da** gustoj. Ni havas **iom da** tempo por babili. Ŝi faris **iom da** eraroj en sia letero. Li pretas prunti al mi **ĉiom da** mono. Ili havas **neniom da** filinoj kaj **neniom da** zorgoj. Kiom **da** ridinda estas en ĝi.

## Rimarko 5

**Da-esprimo** staras kutime tuj post sia kvantesprimo, sed ĝi ankaŭ povas funkcii memstare en alia loko de frazo, ekz.: **Da neĝo** ni havas kiom ni volas. (= Ni havas tiom **da** neĝo, kiom ni volas); **Da anasoj kaj anseroj** li havis multe. (= Li havis multe **da** anasoj kaj anseroj).

Multaj esprimoj **neniam** havas kvantan signifon, do post ili oni neniam uzas **da**. Ekz.: speco **de** vino, tipo **de** homo, manko **de** akvo, perdo **de** mono, plena **de** eraroj, regiono riĉa **je** riveroj kaj lagoj, libro abunda **je** proverboj.

La prepozicion **da** oni neniam uzas en la jenaj situacioj:

- antaŭ **la** artikolo (peco **de** la pano, sed peco **da** pano),
- antaŭ **ĉiu, ĉiuj, tuta** (kelkaj **el** ĉiuj soldatoj – kelke **da** soldatoj; nur kelkaj **el** ĉiuj voĉdonantoj – kelke **da** voĉdonantoj).
- antaŭ montraĵ, personaj, posedaj kaj nombraj pronomoj aŭ adjektivoj (500

# Demandoj pri pola historio...

Estimata samideano Bogdan, ĉu Vi konas tradukon de la suba poeziaĵo al Esperanto? Mi dezirus ĝin ekposedi. Certe Vi scias ke ĝi legita strofo post strofo vertikale donas alian sencon ol legita horizontale tuta linio post linio.

**Georgo Kilijański**

Samideano Georgo!

Bedaŭrinde mi ne havas tradukon de tiu ĉi versaĵo. Ĉu Vi demandis aliajn esperantistojn? Eble ni dissendu la demandon?

**B. D.**

Kara Samideano,

mi ne trovis la E-tradukon de la versaĵo, sed malgraŭ, ke mi neniam provis traduki versaĵojn al Esperanto, do hodiaŭ mi kuraĝis provi!

Vidu sube kaj ruĝe. Eble tiu mia provo instigos iun spertulon fari profesie la tradukon.

Kore,

**Eduardo Kozyra**



zlotoj **da** rento – rento **de** 500 zlotoj; dek jaroj **da** vivo – dek jaroj **de** sia vivo).

- Post **duono**, **triono**, **kvarono** ktp. (Li aĉetis duonon **de** torto; Ŝi manĝis nur trionon **de** granda pomo; Pasis jam kvarono **de** horo).
- Post la vortoj **parto**, **frakcio**, **sekcio**, **klubo**. (Parto **de** korpo, frakcio **de** parlamento, sekcio **de** vintraj sportoj, klubo **de** rosmaroj).

Ni memoru tamen, ke: kvaronjaro estas **peco da** tempo, sed kvaronjaro estas **parto de** jaro; oni skribas: **duono de** monato, sed **kelke da** monatoj; parto **de** jaro, sed parto **da** tempo.

Finante, mi deziras al karaj legantoj de *Pola Esperantisto* multon **da** bona kaj feliĉa, pli **da** mono por so-

mera ripozado kaj neniom **da** zorgoj en ĉiutaga vivo.

***Jen kelkaj proverboj kun la prepozicio da el la Proverbaro Esperanta prilaborita de Ludoviko Zamenhof:***

- En ĉiu malbono estas iom da bono. Ju pli da donoj, des pli da amikoj.
- Ju pli da honoro, des pli da laboro. Ju pli da babilado, des pli da pekadado.
- Kiom da kapoj, tiom da opinioj. Kiom da homoj, tiom da gustoj.
- Pli da mono, pli da zorgo. Neniom da oro, sed bona gloro.
- Malpli da havo, malpli da zorgoj. Pli da havo, pli da klopodoj.
- Kolera, kiel centoj da diabloj. Multe da sprito, sed neniom da profito.



Jen tamen aperis la traduko kvankam (laŭ klarigo de sinjoro Skorupski) –  
aŭtoro de la versaĵo ne estas Miłosz.  
Jen la traduko de Edward Kozyra.

**Bogdan Dembiec**

## La versaĵo...

Runą i w łunach spłoną pożarów  
krzyże kościołów, krzyże ofiarne  
I w bezpowrotnym zgubi się szlaku  
Z lechickiej ziemi orzeł Polaków

O Słońce Jasne, wodzu Stalinie  
Niech słowa Twoje nigdy nie zginą  
Niech jedna ortów prowadzi gwiazda  
Partia i Kremłu płonąca gwiazda

Na ziemskim globie flagi czerwone  
Będą na chwałę biły jak dzwony  
Czerwona armia i wódz jej Stalin  
Odwiecznych wrogów swoich obali

Zmienisz się rychto w wielkie spaliny  
Polski i Twoje córy i syny  
Wiara i każdy krzyż na mogile  
U nóg nam legną w prochu i pyłe

## ...kaj ties traduko

*Falos, forbrulos en flamoj veraj  
krucoj preĝejaj, krucoj oferaĵaj  
Pereos en senreven' itiner'  
La aglo de poloj, el pola ter'*

*Ho estro Stalin, Suno Brilanta  
Estu ideo ne pereanta  
Gvidu nur unu de la agloj stel'  
Partio de Kremlo, la ruĝa stel'*

*Sur la terglobo la ruĝaj flagoj  
Sonorilos por la gloraj agoj  
Estro Stalin kun Ruĝa Armeo  
Igu malamikojn al pereo*

*Baldaŭ vi estos nur brul-odoro  
De pol-gefltoj, de pola koro  
La kredo kaj kruco sur la tombo  
Ĉio pereos en hekatombo.*

**Czesław Miłosz (?), Lvovo 1939 j.**

\* Laŭ sciigo de mia forpasinta patro, kies gefratoj loĝis en Lvovo, tiun ĉi versaĵon verkis tieaj polaj patriotoj, kontraŭ „patriotisma” agado de Wanda Wasilewska. La versaĵo respegulas samtempe kaj ŝian, kaj ilian starpunkton, depende de la maniero legi ĝin – vertikale aŭ horizontale.

**Kazimierz Leja**

## La bestoj

Ĉiutage ni renkontas diversajn bestojn – amataj, prizorgataj, sed ankaŭ neglektitaj, timigitaj, malsataj. Ilia sorto ĉiam dependas de la homoj kiuj bedaŭrinde ofte estas por ili indifereantaj aŭ eĉ kruelaj.

Kaj ni devas memori, ke ĉiuj bestoj estas niaj „pli junaj fratoj”, ke Dio amas kaj protektas ĉiujn siajn kreitaĵojn.

Multaj homoj traktas bestojn kiel sian proprietaĵon, opiniante ke ili havas por tio rajton donitan de Naturo. Sed de kie ili havas tiun certecon? Ĉar Naturo mem nenion pri tio scias.

De la jarcentoj jam ni homoj loĝas kun bestoj sub la sama tegmento, en la sama medio, kaj ni devenas de la sama mamula familio.

Inter la homoj kaj la bestoj estas ankaŭ facile rimarkebla anatomia kaj fiziologia simileco, ankaŭ analogiaj organismaj organoj.

Kompreneble ekzistas psika diferenco, ĉar por bestoj tute fremdaj estas spiritaj valoroj, moralo kaj religia vivo. Ankaŭ ili ne posedas parolkapablon, kvankam – precipe hundoj kaj katoj – scipovas montri siajn sentojn per gestoj kaj sonoj – kaj ili havas multajn aliajn eblecojn, antaŭsentojn, ktp. Generale la bestoj estas por ni proksimaj kaj amikaj estaĵoj, kvan-

kam ili plenumas ĉiam servan rolon.

Niaj hejmaj zorgatoj „ekkonis” homan lingvon, alkiutimiĝis al niaj kondiĉoj, sed tute alie ili perceptas la vivon, kaj ĉion, kio ĉirkaŭas nin.

Se pli altnivelaj bestoj estas sentemaj al la homa boneco, kaj ili vekas ĉe ni la sentimenton de bonvolemo kaj simpatio.

La plej popularaj kaj proksimaj al ni bestoj estas sendube la hundo kaj la kato. Pri ekkompreno de tiuj du specioj okupiĝas nun la nova scienco – antropozoologio.

La plej freŝaj sciencaj genetikaj esploradoj pruvas, ke la hundo certe devenas de lupo, sed ĝis nun ne ekzistas dokumento pri antaŭuloj de la kato, kiu estas parencita kun ses specioj de rabobestoj.

Antropozoologio estas nun tre grava scienco kaj ĝi rapide progresas – precipe en la okcidentaj landoj. La kaŭzo de tiuj esploroj estas tre praktika, ĉar oni konstatis, ke la interrilato kun bestoj povas esti efika terapio dum kuracado de diversaj malsanoj – precipe psikaj – kaj ankaŭ helpas dum edukado de korektodomoj kaj en malliberejoj.

Ĝis nun oni ne scias, kial niaj prauloj hejmigis ĝuste tiujn du bestaj speciojn – sed eble ili rimarkis profiton el la vivo kun ili.

Povas esti, ke la hundo mem alpaŝis al ĉasanta prahomo, ĉar dank' al li la besto povis pli facile atingi viandorestaĵojn kaj ostojn. Tiuj frandaĵoj eble allogis ankaŭ la katon, kiu en grenejoj certe povis trovi bestajn noculojn, kaj per tio fariĝis tre utila.

Dum longa tempo la sciencistoj opiniis, ke hundoj kaj katoj vidas la mondon nur en la koloroj nigra kaj blanka. Nun oni scias, ke ili perceptas ĉion preskaŭ same kiel ni, sed sen ruĝaj koloroj. Tamen ili kapablas kapti eĉ plej delikatan movon, kaj havante en la okuloj reflektan membranon ili rimarkas eĉ plej malgrandan kvanton de lumo dank' al kio ili vidas nokte (sed ne en plena mallumo).

La bestoj, precipe hundoj, havas perfektan flarsenton, kion profitas ofte policistoj por serĉi narkotikaĵojn, malaperintajn homojn, spuri krimulojn... ktp. Ankaŭ ĝia bonega aŭdokapablo permesas al ili aŭskulti la sonojn de tre malproksima distanco – kaj ili ĉiam scias, kiam revenas amata familiano, eĉ se tiu estas ankoraŭ malproksime.

Ĉiuj bestoj, sed antaŭ ĉio katoj havas specialan kapablon antaŭsenti proksimiĝantan tertremon multe pli frue ol la plej perfektaj aparatoj. Ili ankaŭ atentigas pri incendio, aŭ pri alia minacanta danĝero. Inter hundoj kaj katoj estas granda diferenco, ĉar aliaj estas iliaj kutimoj kaj vivmaniero.

La hundo senĉese vizitas kaj malkovras novajn terenojn, estas tre scivolema kaj enŝovas nazon en ĉiun truon. Dum promenado ĝi senĉese

flaras herbon, benkojn, lanternojn, kaj ĝi ŝatas kuradi, kapti ĵetitan bastoneton kaj lasas siajn vizitdokumentojn por aliaj hundoj.

La kato promenas plej ofte solece laŭ propraj vojoj, kaj ĝi ŝatas kontroli, kio troviĝas malantaŭ bariloj. Ĝi ŝatas ankaŭ malkovri novajn terenojn kaj tio estas por la kato tre serioza okupo. Lacigita pro longa vagado ĝi volonte revenas hejmen al sia bovleto kaj ŝatas ripozi sur la genuoj de ŝatata familiano.

Sed hundoj kaj katoj simile ĝoje bonvenigas revenantan hejmen sian sinjoron, sed per tute alia maniero. La hundo ekvidante familianon gaje saltas, bojas kaj vostumas; la kato vostosvingas kaj murmuradas. Ili ambaŭ ege ŝatas amuziĝon, kaj spite al la proverbo: „vivi kiel hundo kun kato” ili ofte estas fidelaj amikoj, ankaŭ por aliaj bestoj.

La bestoj, kiel la tuta Naturo estas belega donaco de Dio, kaj por ni, homoj, la fonto de feliĉo kaj ĝojo.

Ni devas esti por ĉiuj bestoj bonvolemaj kaj zorgemaj, ĉar ili vere bezonas kaj meritas nian protekton.

Ni amu bestojn – ili estas tiel belegaj!




*Bojas hundo sen puno  
eĉ kontraŭ la suno.*

*Inter lupoj krii lupe.*

**El „Proverbaro Esperanta”  
de L. L. Zamenhof)**

## Krucvortenigmo (de Marian Zdankowski)



1. ceremoniar' ĉe kortego
2. vira soprano
3. malbona stat' de organ-korpo
4. furioza, nervoza, malbonhumora
5. malĝusta opini', kondukt' aŭ far' (malgranda)
6. ruĝa legomo

***Sendu solvon al la redakcio ĝis la 20a de marto.  
Inter sendantoj ni lotumos interesan premion!***

## Humoraĵoj (elpoligis Bogusław Sobol)

Ŝi:

– Ĉu vi devas ĉiutage ĝis la dua nokte  
sidi en drinkejo?

Li:

– Ne. Mi tion faras libervole.

– Ĉu vi vidis? Kowalska denove pro-  
menis kun kvarpieda amiko.

– Mi ne sciis, ke gesinjoroj Kowalski  
aĉetis hundon.

– Ili ne aĉetis. Kowalska eltiris edzon  
el drinkejo kaj li iris kvarpiede.

– Kial drinkante brandon vi fermas la  
okulojn?

– Ĉar kuracisto malpermesis rigardi  
en kalikon.

– Doktoro, ĉu vi povus ion doni al  
mi, por ke ne tremu miaj manoj?

– Kaj ĉu vi multe drinkas?

– Ne, pli multe mi disverŝas.

Kuracisto al paciento:

– Ĉu vi drinkas?

– Kaj ĉu vi havas ion?

– Jam dekkvarfojon mi kondamnas  
vin pro la ebrieco – diras juĝisto.

– Mi pensas, ke mi jam ne ekvidos  
vin ĉi tie estonte.

– Ĉu vi sinjoro juĝisto emeritiĝos?

Policisto haltigas aŭtomobilon kaj  
malfermas pordon. Frapas lin mal-  
bonodoro de alkoholo. Ĉe la stir-  
rado sidas ebria ŝoforo:

– Kiamaniere vi en tiu ĉi stato enaŭt-  
iĝis?

– Kolegoj helpis.